

OFICIALA ORGANO DE LA AUSTRALIA ESPERANTO ASOCIO

LA RONDO



THE AUSTRALIAN ESPERANTO MONTHLY

ELDONITA DE F.R. BANHAM.  
2 BANCHORY ST. ESSENDON W.5  
VICTORIA AUSTRALIA.

VOL. 6 No. 4

Jan 1946

NI GARDU LA SANKANKTAN FLAMON.L A R O N D O.L A R E D A K C I O.

S-ro F.R.BANHAM, D.B.E.A. REDAKTORO.  
2 Banchory St., Essendon, W5 VIC.

F-ino L.E.BAILEY, D.B.E.A.  
18 Sherbourne Rd., Medindie Gdns., Adelaide,  
S.AUS.

F-ino W.A.ADDIS, KASISTINO,  
25 Greville Ave., Flinders Park, S.AUS.

SOLDATO, SKLAVO KAJ SATIRISTO.La SPRITO kaj SAĜO de CERVANTES.

Sep urboj pretendis nomi sin la naskloko de Homero; simile, sep urboj faradis tion pri la plej fama Hispano, sed la enskribaĵo en la baptoregistro de urbeto Alcalá de Henares atestanta, ke tie Miguel de Cervantes Saavedra ricevis en la eklezion la 5an de Oktobro, 1547, kaj la amo kun kiu Cervantes mem ĉiam parolis pri Alcalá kaj ties "fama Henares," parolas konfirme por la ĝenerala kredo. Tamen, liaj samtempuloj ne ĝuste lin taksis, kaj longe li devis kuŝi en la ĉerko antaŭ ol Hispanoj lian ĝenon sentis sufiĉe forte por ekkolekti la nemultan materialon kun celo verki biografion.

AVENTURA VIVO.

Junule, Cervantes renkontis klerulon, Juan Lopez de Hoyos, kiu instruis al li gramatikon kaj emigis lin al sciakirado. En la 22a jaro li komencis siajn spertoriĉajn vagadojn. Pro familiareco kun la diversaj socitavoloj li vastigis al si la spiritehorizonton kaj riĉigis sian simpatian ĝis tiela grado, ke li povis produkti unu el la plej bonaj libroj de la honaro.

Ankaŭ Kardinalo Acquaviva estis por Cervantes patrono, sed vivadi en la domo de granda ekleziulo konformis malbone kun lia naturo; li do ekserĉis aventurojn. Ĉe Lepanto, unu el la decidaĵaj bataloj de la historio, li kuraĝe servis kaj suferis frakasitan manon. En 1575 lin kaptis piratoj, ĉe kiuj li devis sklavi kvin dolorajn jarojn antaŭ elaĉeto. Tiam denove al la armeservo, en Portugalujo, kie li eksteredze naskigis sian solan infanon, Isabel, kiu en posteaj jaroj komfortadis lin en lia maljuneco.

En 1584 Cervantes edziĝis, kaj eldonis sian unuan verkon, "Galatea," idilian romanon, kiu donis antaŭguston de la spirito kaj brilo, kio tiel riĉe floris en lia postea verkado. Liaj noveloj estas el la plej bona speco; sed, malgraŭ tio ke li skribis proksimume tridek dramojn dum sia meza aĝo, nur du sukcesis transvivi la jarojn ĝis niaj. Tre feliĉe tial, ke li baldaŭ sin turnis for de dramverkado al literatura formo pli konforma kun lia genio.

### La PLEJ FAMA LIBRO de HISPANUJO.

La unua parto de "Don Kiĥoto," eldonita en 1605, alportis al sia aŭtoro ne multe da mono, ĉar la profito plejparte iris en poŝojn de librovendistoj kaj literaturopiratoj. Laborante super plilongigo de la "Unua Libro," li kolere ekvidis aperi iun falsan "Duan Parton" de "Don Kiĥoto." Sed la malhonesto plagiato, komparate, montriĝas el kvalito forte malsupera. Nur tre malofte la sama epoko produktas du homojn kapablajn verki "Don Kiĥoto."

En 1615 Cervantes aperigis la "Duan Parton;" en ĝi, kun bona humoro kaj digno, li rebatas pro la maljusto al li direktita. Sanĉo, verŝante proverbojn, pritraktas sian imitulon por gaja malestimo. Rivalas la verkon nur la unua parto, en kiu la aŭtoro, jam aĝa 70 jarojn, malfermas por la mondo trezorujon de diraĵoj brile originalaj, profunde saĝaj. La 19an de Aprilo 1616 li mortis, proksime la morton de Shakespere, kun kies spirito li havis multon komunan.

### ĈU SHAKESPERE ĜIN LEGIS?

Kvankam "Don Kiĥoto" estis populara en Hispanujo jam de sia apero, ĝia efektiva reputacio kiel unua establiĝis ekster Iberio. Anglujo rajtas pretendi unuaecon agnoski la genion de Cervantes, ĉar en la kruda sed pitoreska lingvaĵo de Shelton la verko por lu unua fojo estis tradukita---la unua parto en 1612, la dua en 1620. Shakespere, do, tre povis esti leginta ĝin antaŭ sia morto. "Don Kiĥoto," same kiel ĉiu libro de alta imagi-povo, konservas sian plenan guston nur en la originalo, sed nenia libro, krom la Biblio kaj eble "La Progreso de la Pilgrimanto," estis tiel multfoje tradukita, aŭ en tiom multe da lingvoj. Estus neracie, esperi perfekte reprodukti la delikatan vortludon, la subtilajn aludojn kaj duoblajn signifojn, la ĉarmon de la facila simpleco, sed ja multon kelkaj lerte sukcesis redoni, por ekzemplo: en la tradukoj de Motteaux, Smollett, Jarvis kaj Ward.

### PRI KIO LA VERKO TEMAS?

Ne estas facile diri pri kio la libro temas. Ĝi ne havas planitan rakonton, aŭ ĉeflinion de agado sinsekve disvolvigita. Ŝanĝmoviĝanta amaso da drinkejestroj kaj biensinjoroj, soldatoj kaj ciganoj, pastroj kaj vaguloj, ŝtelistoj kaj belulinoj, kon-

sistigaŝ svarmantan fonon por tiu ĉi ĉefverko de komedio kaj kortuŝo. Ĝi estas la granda prototipo de tiu tuta klaso de varkado karakterizita de strangaj aventuroj, sencelaj vagadoj, plezuraj sed iom trolongaj anekdotoj kaj detalriĉaj rakontoj. "Gil Blas," de La Sage; "Joseph Andrews," de Fielding; "Lavengro" kaj "The Romany Rye," de Borrow; "The Pickwick Papers," de Dickens, estas ĉiuj fruktoj de tiu arbo fekunda.

### PRO KIO CERVANTES ĜIN VERKIS?

Jam jardekojn dubo enŝteliĝis en la iam preskaŭ universalan kredon, ke Cervantes verkis "Don Kiĥoto" precipe kiel proteston kontraŭ la ridindeco kaj eĉ malbona influo de la tielnomita literaturo de la kavalireco. La bazo de tiu kredo ŝajnas esti rimarko, ne de Cervantes, sed de ties amiko, en la Antaŭparolo al la Leganto: "...ĉi tiu via verkaĵo sole celas detruĝi la aŭtoritaton kaj bonakcepton, kiujn la libro pri la kavalireco havas inter la homoj." Ni devas rimarki, ke en 1617, nur du jarojn post la kompletigo de "Don Kiĥoto," Cervantes verkis "Persiles kaj Sigismunda" en la bombasta kaj malflua stilo de ĝuste tiuj absurdaĵoj kontraŭ kiuj laŭ ĝenerala kredo Cervantes forte malfavoris. "Persiles" neniel similas satiron aŭ parodion; male, ĝi estas sincera, entuziasma imitaĵo de tiu ridinde troigeca literaturo, kiu frenezigis la kompatindan sinjoron de La Manĉa. Pri tiu ĉi, la plej malforta de siaj verkoj, Cervantes altŝate opiniis; sed, se ni rajtas juĝi laŭ la indiferenta, eĉ malestima takso de sia ĉefverko, li, sankiel la samtempuloj, neniel povis kompreni ĝiajn efektivajn fundon kaj gravsignifon. Li menciis ĝin konfuziĝeme, preskaŭ hontante, kiel "nur seka sengusta legendo, ne valoranta kandleton; mankas al ĝi bona lingvaĵo kaj ankaŭ originaleco; troviĝas en ĝi neniom da ideoj aŭ pika sprito."

Nek amo, nek satiro, nek manko de simpatio al la romanoj kavaliraj, sed ia alia motivo, kies naturon eĉ la kreinto mem ne sciis, jen la mistera io, kio ŝajnas konsistigi la fonton de tiuj ridoj kaj ploroj, kiuj entekse formas ĉi tiun ĉefliteraturajon. Simile kiel ĉe la Angla poeto Pope, kiu "kiam infano, babilis per ritmo-rimo, tial ĉar ĝi nature venis al liaj lipoj," tiel ankaŭ la genia homo de La Manĉa senpene elverŝis oran riveron da sprito kaj saĝo. Ne la malplej cerbumiga el la onigmoj, kiujn prezentas la genio, estas tiu pri la pasiveco aŭ senkonscieco de la homo elektita tra kiu la genio sin manifestas. Ĉiuokaze, "la plej malzorge verkita el ĉiuj grandaj libroj," malgraŭ ke mankas al ĝi belfariteco struktura aŭ artisma, tamen ĉiam interesos al la homoj kiel homoj, ĉar ĝia aŭtoro estis humanisto, kiu nek prikoleris nek flatis siajn kummortemulojn, sed skribis pri ili, sentante en si mem iliajn virtojn kaj malvirtojn. Malgajiga penso estas tio: ke la Hispanoj de lia tempo ne povis ĝuste kaj juste taksi ka kuraĝon de tiu honorcikatrata vastanimulo kun lia "honesto vizaĝo, barbo arĝentgriza, kaj kaŝtanaj haroj," kiu en malriĉo

eltenis kun brava koro la neestimon kaj malgentilecon de kunhomoj, kaj testamentis al ili kaj al ĉiuj postsekvontoj veran trezoron---libron, kiu ridas kun la gajaj, ploras kun la malfeliĉaj, donas distron al facilanimaĵoj, kaj filozofion al la saĝaj.

Aperis Angle en The Age, 30 Marto, 1940

-----F.R.BANHAM, D.B.E.A.

### NATIONAL LANGUAGES ARE NOT ENOUGH.

Thousands have discovered that it is not true that "English will get you anywhere." They have learned that the study of one or two foreign languages is not enough to make John Jones a citizen of the world, capable of taking the linguistic hurdles in global intercourse. Few persons learn to master one or more foreign languages completely....one can, however, by streamlined methods...obtain a useful acquaintance with several of the major languages and learn enough about the others to recognise them when one sees them written....Some Esperantists believe that the promotion of an Interlanguage will or should have the consequence of eliminating the study of other languages. This is entirely unlikely to happen, and in my opinion it would be undesirable. Language learning is here to stay....Esperantists should not regret this. The need for an Interlanguage for global intercourse will be felt even more acutely, regardless of how many Americans study Spanish, Russian or Chinese. (Such study) can never solve the problem of an international auxiliary language. (Dr. W.Solzbacher in "American Esperantist.")

### ONE AUXILIARY LANGUAGE.

(The following article appeared in the July-August issue of the "American Esperantist.")

Many accounts of the tremendous language problem at the United Nations Conference have come out of San Francisco. A description by John Metcalfe was printed in the "Herald-Tribune," June 3, 1945. It was titled, "The Biggest translation Task in History burdens Parley: Many words cannot be expressed in all five languages; Russian copies are made on Special Typewriters, Chinese in Longhand." It goes on to say, "...the translation bureau of the secretariat did not fully realize the immensity of the undertaking until after its directors had arrived in San Francisco. In part, this was owing to the conference decision to have not only English and French as official diplomatic languages, but also Spanish, Russian and Chinese." In the concluding paragraphs it said, "Even the League of Nations never was confronted with so enormous a task."

The following letter appeared in newspapers throughout America. We reprint it from the "San Francisco Examiner": "When Molotov spoke at the great conference, he spoke in Russian. Then a translator gave it in English. Then a translator gave it in French. Even thus, there were many delegates who could not understand.

More and more we are becoming one world. More and more we need one language. We cannot change our mother tongue---we can have one auxiliary language---the easily learned Esperanto."

Everywhere, the concept of "One World" is being advanced. President Truman at Kansas City said, "The world is no longer county size, no longer state size, no longer nation size---it is one world, as Wilkie said." The concept of "One World" composed of many interdependent nations, absolutely requires the concept of "One Auxiliary Language"---the easy neutral interlanguage Esperanto---to serve the many national-language groups for general interchange. We must advance the concept of world-wide intercommunication by the practical application of the living interlanguage Esperanto, to the end that "one world" may speak with "one voice," on a neutral interlingual foundation.

### PAGO PROKRASITATA.

La pafo frakasis la serenan pacon de la montoj, kaj eĉe re-sonis inter la krutoj kaj valoj. Bimbo rigardis alian patrinon fleksfali malrapide al la tero, kaj pensis, ke sendube, tio ĉi estas nova ludo kiun ŝi ludas. Li petole kuris al ŝi.

Sed subite venis al liaj naztruoĵ nova, stranga odoro, kaj li haltis. Neniam antaŭe li renkontis tiun odoron, sed nun ĝi kuŝis peze ĉirkaŭ lian patrinon. Stranga tio! La varma amika odoro de la patrino cedis al tiu ĉi nekonata odoro. Ĝi naskis antaŭsentan malvarmecon en lia koreto. La unuan tempon en la vivo. Bimbo flaris morton..

Li ne tiam sciis, ke li estas orfo, soleca eta ursido kiu ne plu havas la krudan kaj bonkoran protektadon de la patrino. Li ploretis kaj alproksiniĝis al ŝi. Li vokis ŝin, sed ŝi nek moviĝis, nek respondis.

Kiam la homoj eliĝis el la arbaro kaj piediris al li, eĉ tiam li ne moviĝis. Li neniam antaŭe vidis homojn, do ne timis, sed la nova odoro ekremetis la harojn ĉe lia koldorso. Io devigis lin forkuri por la vivo. Li kortuŝe ploretis, ekrigardetis la patrinon kaj kuris al la arbaro. Unu el la homoj ridis.

Kiam la homoj jam foriris, li revenis al la maldensejo. Li ne povis igi sin forlasi la lokon. Li manĝis kelkajn akridoĵojn kaj insektoĵojn elĵetitajn sur la bordon de la lago sed ankoraŭ malsatis. Li ploris kaj ploretis kaj ne povis kompreni la tragedion kiu eniris la vivon.

La sekvantan tagon li sidis, kiel multfoje antaŭe, antaŭ la zorgemaj okuloj de la patrino, sur faliĝinta arbustumpo ĉe la rando de la lago. Gibe kaŭranta, malgaje pensanta en sia mizero, li nek vidis nek aŭdis la montan leonon ŝtele alrampantan el la arbaro. Tamen, ia senso avertis lin pri lia danĝero, kaj li turne rapidiĝis por fronti la lagon.

Momente li funde rigardegis en la minacajn verdokulojn de morto. Timego rigidis liajn membrojn. Liaj malgrandaj, nigraj okuloj, rondaj kiel butonoj, renkontis tiujn de la kaŭranta leono.

Lia timego savis la vivon. Timigita preskaŭ ĝis morto, li lasis la ungojn gliti de sur la glata ligno kaj falis en la malprofundan akvon. Tie li kaŭris, suprenrigardanta al la leono, kiu penis atingi lin per sia piedo. Paralizita pro teruro, la ursido sidadis senordiginta kaj tremanta. Iamaniere, lia furioze batanta koro alproksimiĝis lian gorĝon.

Sed la leono iĝis senpacience, kaj flarante montan ŝafon, li murmuregis kaj fiere marŝis for. Bimbo longe atendis, trempita, malpura, malvarma, mizera, antaŭ ol li trenis sin el la akvo.

La suno baldaŭ sekigis lin, kaj li serĉis pli sekuran lokon. Je ia distanco de la lago, li trovis grandegan rokfalajon kaj premis sin en malgrandan kavernon inter du rokoj. Tie li dormis.

La sekvantan tagon, li ŝtele rampis al la lago. Lia eta nazo sulkiĝis kaj li kortuŝe krietis, sed nenia patrino alvenis piedŝovanta el la arbaro. Laodoro preskaŭ jam malaperis. Tempospace li fosis sencele ĉirkaŭ la stumpo kaj maĉis kelkete da folioj. Li estis malsata kaj soleca.

Fine laodoro de la patrino tute malaperis kaj nenio restis por rememorigi lin pri la loko. Do, li ekiris por la pinto de la monto. Supren li grimpis al la arbarejo kaj pluen al la mola neĝo. Li vidis multajn piedsignojn kaj flaris multajn strangajn odorojn, sed li daŭris. Kien li iris li ne sciis---kaj pri tio estis indiferenta.

Li jam trapasis la pinton de la monto kaj atingis la arbarejon ĉe la kontraŭa flanko kiam li unuafoje flaris urson. Liaj vilaj oreletoj antaŭen iris kaj lia nazo sulketis. Ursoodoro! ne lia patrino. Li rampetis pli proksimen.

La vento direktiĝis al li, do li proksimiĝis la malgrandan densejon kaj vidis la patrinan urson kaj ŝian idon antaŭ ol ili vidis lin. Li kaŭris malalte sur la grundo kaj rigardis. La patrino estis suspektema. Ŝi daŭris ekstariĝi kaj flareti la venteton. Fine ŝi kaptis la odoron de la ursido, kaj restis staranta, la nazon ekskuetante, ŝerĉante vidon al la urso, pri kies ĉeesto ŝia nazo informis ŝin. Ŝi antaŭen iris kelkajn paŝojn strafe, post ŝi ŝia vigla ido, kaj rigardegis al Bimbo. Kiom stulta estas ŝia ido, pensis Bimbo, pro tio, ke li trenis unu kruron strangmaniere post si. La patrino pliproksimiĝis, la lama ido plirapidis, nedezirante esti postlasita. Ŝi apudiĝis al Bimbo kaj sidigis por atente rigardilin.

Bimbo hezitis, necerta pri ŝiaj reagoj, kaj ploretis. La lama ido malrapide paŝis liadirekten kaj ili nazumis sin explore. La lama ido repaŝis al sia patrino kaj haltis por postrigardi al Bimbo, kiu hezite antaŭen iris. Timigita, li ankaŭ haltis. Poste, kun la tuta kuraĝo en siaj piedetoj, li paŝetis al la patrina urso. Ŝi antaŭen kliniĝis, flaretis lin, tiam, donante al li amikecan bateton al la oreloj, ŝi turnis sin kaj kondukis ilin trans

la maldensejo. Bimbo jam trovis patrinon!

Sed la sorto ankoraŭ ne finis pri Bimbo. Unu tagon okazis io en tempo kiam la tuta monto estis banata en paco. La du ursidoj petole grimpis sur arbustumon dum la patrino forpuŝis ilin. Ili ĉiuj grandege ĝuis la ludon kaj kojoto aliris por rigardegi la strangan vidaĵon. Sciuro haltigis sian babiladon kaj rigardegis. ...Pafo sonoritis tra la valo kaj la bonkora maljuna ursino falis baraktanta al la tero. Alia pafo, kaj la lama ido renverse falis de la stumpo.

Bimbo memoris la lastan tempon en kiu li aŭdis tiajn pafojn. Li sciis ke ili signifas morton kaj li kuris kiel neniam antaŭe. Sed ĵus atinginta la arbaron, li sentis akran doloron en unu kruron, kiu fleksfalas sub lia pezo. Li ploretis kaj falis, sed ree pene iranta, li kuŝiĝis sub stumpo.

Pli alte sur la monto, Davido aŭdis tiujn pafojn kaj haltis. Li kalkulis ilin kaj pli rapide antaŭeniris. Li amis bestojn kaj sentis malplaĉon ke oni pafu ĉirkaŭ lia kabano.

Lia ŝanco estis tute mankinta en tiu tago. Li estis laca dum li hejmen iris, ĉar li estis malproksime marŝinta, serĉante la malfacile troveblan flavan metalon. Sed malgraŭ ke li estis laca, liaj viglaj okuloj penetre serĉis la arbejon dum li proksimiĝis la lokon de kie li opinie la pafoj venis.

Li subite haltis kiam li vidis du malgrandajn, nigrajn okulojn, kiuj rigardis lin de sub la stumpo.

"Dio helpu min, ĝi estas urso!" li murmuris. "Kaj ankaŭ juna!" Li sin klinis kaj eltenis la manon al la ursido, kiu time kuntiris sin. Ĝi bleketis kaj montris la dentojn.

"Kio estas al vi, etulĉjo?" li diris, "Vi aspektas malsana!"

Lia forta mano alkroĉiĝis en la felo malantaŭ la kolo de la ido, kiun li trenis el ĝia kaŝloko.

"Bona Dio!" li ekkriis kiam li vidis la frakasitan, sangan etulon kiun li tenis, skuigantan en sia mano. Evitante la akrajn ungojn, Davido ŝovis la timigitan Bimbon en malplenan sakon, kaj daŭrigis sian hejmen-vojaĝon. Li prenis la ursidon al sia kabano, kaj bandaĝis la vundon. Bimbo baraktis kaj ploretis, sed tiu nenion valoris en la fortaj manoj de la homo. Poste Davido portis la idon al malgrandan forta ŝedo kaj enseruris lin kun liaj pensoj kaj kelketsakoj por varmeco.

Kun diversaj sentoj Bimbo rigardis la homon eliri kaj la por-don fermiĝi. Li faris vojaĝon ĉirkaŭ la muroj, sed lia kruro doloris, do li sidiĝis sur la sako kaj mallaŭte ploretis. Post iom da tempo li kurbiĝis kaj dormis.

Kelkajn semajnojn Davido tenis la ursidon serurita en la ŝedo, nutrante ĝin ĉiun matenon kaj vesperon. Lia ŝanco estis ŝanĝinta kaj li nun rigardis Bimbo kiel bonŝancan talismanon, kaj ne deziris ke ĝi foriru. Tamen lia bonkoremo ne permesis lin teni mallibera la idon kiam ĝia kruro jam resaniĝis, do unu tagon li larĝe mal-



fermis la pardonon de la ŝedo kaj flanko staris.

"Alvenu, etulĉjo," li diris, "Vi nun resaniĝis. Venis la tempo je kiu ni apartigu. Mi abomenas adiaŭi vin...sed...mi opinias ke mi ne povas ne tion fari."

Bimbo ne povis kompreni, sed li vidis la malferman pardonon kaj jetis sin al ĝi. Li estis iom surprizita kiam la homo ne penis lin haltigi. Li atingis la malfermejon kaj malantaŭen rigardis.

Davido apogis sin kontraŭ la kabano kun milda rideto.

(de James Preston, The Express, 1/12/45. Iom ŝanĝita.)

-----L.E.BAILEY, D.B.E.A. (Trad.)

### TRADUK-KONKURSOJ.

#### Traduko de Konkurso 29.

Woodview-strato ne pretendas. Ĝi estas nur parto de la Sudokcidenta Antaŭurbo, kaj scias tion. Antaŭ multaj jaroj ĝi certe havas alian ideon pri sia graveco, ĉar ĉiu domo havas vendistan enirejon. Nun vendistoj frapas ĉe la frontpordoj. En ĉiu domo, viro kaj lia edzino kun du aŭ eĉ tri infanoj povas loĝi tute komforte, kaj restas sufiĉe da spaco por unu aŭ du subluantoj. La enspezo el la subluado ebligas al la familio, loĝi en modere granda domo; ekzistas ankaŭ malantaŭa ĝardeno, ĝuste sufiĉe granda por mastrumaj celoj, domaj kunikloj aŭ kolomboj kaj eĉ kelkaj floroj. Vere, la afero de antaŭrango en la banĉambroj ja ofte kaŭzas embarason, sed geniaj tempotabeloj venkas eĉ ĉi tiun problemon.

Venkinta Grupo: SYDNEY ESPERANTO SOCIETO.

Pro specialaj aranĝoj rilate al la apero de "La Rondo" en la Nova Jaro, la rubriko "Traduk-Konkursoj" provizore ne plu estos publikita. Kun sezonaj salutoj

P.E.SCHWERIN,  
36 McDougall St., Milsons Point, N.S.W.

### ASOCIAJ AFEROJ.

LIBRO-SERVO. Ni feliĉe anoncas prezmalpliigojn de kelkaj libroj tenataj en la provizaĵo de niaj perantoj. La novaj prezoj estas: Esp. Home Student 1/-; Grammar & Commentary (Cox) 9/6; Edinburgh Pocket Dictionary 3/8; Murda en Orienta Ekspreso 2/-; Princino de Marso 2/-; La Princo kaj Betty 2/-; Knaboj de Paŭlo Strato 2/-; Tempomaŝino 2/-; Colomba 2/-; Sep Vangofrapoj 4/-.

La ĉiam popularan Esp-Eng Vortaron de Millidge ni importos por aĉetantoj post ricevo de antaŭpagita mendo 15/-.

KONTOJ. La kontoj de la Asocio por la jaro 1945 sekvas. En ĉi tiu jaro ni prezentas la kunigitajn kontojn de ĉiuj fako de la

laboro.

SPEZOJ ĜIS 31.12.45.

La Rondo, nia Organo	£48,10.4	Kotizoj kaj Abonoj	£46.19.11
Skribmaterialo k.t.p.	3.13.9	Donacoj	16. 2. 4
Afranko k.s.	2.14.1	Procentaĵo	9. 2
Diversaj	5.12.2	Ekzamenoj	1. 8.10
Gajno, al Kapitalo	37.10.8	Gajno de Libroservo	28.16. 2
		" de Koresponda	
		Kursoj	4. 4. 7
	<u>£98: 1:0</u>		<u>£98: 1: 0</u>

BILANCO JE 31.12.45

<u>PASIVO</u>		<u>AKTIVO</u>	
<u>Kreditoroj</u>	£4.14.5	<u>Ŝuldantoj</u>	£27.13..1
<u>Kapitalo</u>		<u>Libroservo-Provizaja</u>	
Je 31.12.44		(Je Kosto)	44.19. 3
£61.11.10		ĉe Banko	£ 6. 4. -
Gajno 37.10. 8	£99. 2. 6	ĉe Kasistino	1. 1.11
		Komisiito	
		Koresp.K.	10. 9. -
		ĉe Sekretario	<u>13. 9. 8</u>
			31. 4. 7
	<u>£103:16:11</u>		<u>£103:16:11</u>

Dum la Jaro la Libroservo vendis legaĵojn valore £93.11.1. La enspezoj de la korespondaj kursoj estis £37.2.6 kaj ĉi-lastata fako elspezis libere, reklamante la kursojn en diversaj gazetoj.

KOTIZOJ. Bonvolu pagi rekte al la Kasistino, F-ino Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, Adelaide. NE sendu al la Redaktoro aŭ Sekretario.

G.H.GILLERMAN, (Sekretario)  
15 Morrice St., Lane Cove, N.S.W.

KASO de La RONDO.

Kvitancoj ricevitaj dum Decembro 1945.

S-roj Dudley, E.Stevens, E.Crowe, E.Shelton, W.Lamb, Clifton, E. Costa 42/-, S-inoj Langtree, Traill 12/-, F-inoj Cox, Sherrington, O'Connor 18/-, S-roj M.Noake, N.Grant, F.McCallum, Gassner, Parsons 30/-, Dr.Woolnough 10/-, Rev.Cowling 6/-, S-ro T.Perry £1, S-ro Rutland 5/6, Dr. Caldera 12/-.....£7.15.6

Al la A.E.A.£1.16.0, Al la Rondo £5.19.6, En la Kaso £3.1.5.

Eraro en Nov. Kontoj: Legu la nomon de F-ino P. Leahy anstataŭ McCleary.

F-ino Addis (Kasistino)  
25 Greville Ave. Flinders Park, Adelaide, S. Aus.

-----  
Korektoj al eraroj en la Decembra:- 32/11 supozas; Kalomano Ka-  
Locsay, /13 akceptis, 33/16 kompleksajn, 37/17 de la mals.,  
liaj samlandanoj, 39/lasta multaj aliaj, 41/23, la flamojn 41/25  
"War Resister," 42/1-2-3, kiuj, bonvolu, sen kio ĝi, 44/19, aus-  
kultas, /24 Ho, justa

-----  
MORTO: La 31 Majo en Mendoza (Argentino), Teofil Duktil, aĝe 51.  
Fervora SAT-ano, puranima idealisto, li faris multon por Esp-o  
ĉe la Hispanlingvaj gazetoj.

GAZETOJ RICEVITAJ. Argentina Esp., P.U.V., Renovigo, World Good  
Will Service, Esp. Internacia, Eta Heroldeko, American Esp-ist,  
E-ista Bahiano, Global Thinking, Official Bulletin of the NZEA,  
Svisa Espero, La Verda Flamo, Worker E-ist, Irlando Vokas.

PIĜIN-ANGLA EN PAPUO. "Kiom koncernas la Papuanojn, la plej mal-  
bona testamentaĵo de la ĵusa milito estas la koruptiĝo de iliaj  
lingvoj kaj de nia," diris "Australian Christian World." "Tiu ĉi  
tempo en Papuo eble ricevos la nomon 'piĝin-periodo.' La unua ad-  
ministracio kaj la Kristanaj misioj bone servis, disvastigante  
simplan puran Anglan kaj respekte-precize uzante la indiĝenajn  
dialektojn. La malkaŝa favorado al piĝin-Angla kaj Motuan estas  
bedaŭrindega devojiĝo for de la tradicia procedo. Eĉ Papuanoj  
kiuj eltenis Anglalingvan ekzamenon de la kvina klaso ("standard")  
sub ŝtataj inspektistoj el Kvinlando, estas devigataj uzi la rid-  
indajn formojn de malpuraĝigita Angla, kiun uzadas rifuĝintoj en  
ilian landon.. La plej malbona flanko de la afero estas, ke for-  
iĝadas ilia komence tre sentata honto."

(S-ro Wanmer, kiu sendis al mi la supran, sugestas Esperanton, kaj  
d emandas al si, kion dirus D-ro F. Williams pri ĝi? F.R.B.)

KARA RONDO: En la Novembra numero mi legis tradukon de la malnova  
Germana rakonto "La Tri Deziroj." Mi konas alian formon, kiu mia-  
opinie estas multe pli bona ol tiu, kiun vi tradukis.

Kiam la malsaĝaj geedzoj ricevis la kolbason, logike nenio  
alia restis al ili ol tio: fordeziri ĝin for de la nazo de la edz-  
ino. Per tiu natura disvolviĝo la rakonto venus al logika fino  
kaj havus sencplenan kernon, ĉar la historioto devus instrui jen-  
on:---Malsaĝaj homoj neniel povas prudente uzi la bonojn de la  
mondo, eĉ kiam tiuj ĉi estas metitaj je ilia dispono. Goethe dir-

as:- Se ili havus la ŝtonon de la saĝulo, mankus al la ŝtono mem la saĝulo.

K. HIRSCHERL.

BOUGAINVILLE, 4 Dec., 45.

Dear Rondo,

I have persuaded the local Army Rehabilitation Training Centre to begin a course in Esperanto. This is also published in the local newspaper "Torokina Times," a copy of which I have sent to the Melbourne Esp. Club. The centre is preparing men for return to civil life, and trains them in everything from psychology to plumbing!

The course began to-day, with 8 students. This compares favorably with the Spanosh class (8 students), Japanese (3) and University German (2), and even English, which has 17 students. Lectures are of one hour, thrice a week. I hope to increase enrolments, but the class may not last long as, owing to the speed of demobilisation, the Centre may be forced to close soon.

However, I hope by then to have got all the students to join the A.E.A. and subscribe to "La Rondo" and buy some dictionaries and textbooks, so that when they drift apart they may still retain contact with the movement. Students include one RAAF pilot officer.

We have no textbooks, beyond "Edinburgh Dictionary," and doubt whether there will be time to get any before the centre closes. But I have given them a typed copy of the 16 rules and the affixes, so with some intensive vocabulary teaching and the aid of a few back numbers of "La Rondo" and "Esperanto Internacia" I have received since arrival here, and the Year Book, should be able to lay a good foundation rapidly. I may make my own reader for a few lessons, but think I can get the boys on to "La Rondo" itself in a very short time.

I gave a lecture in philology recently to a large audience and put in a few good words for Esperanto. There is also one full course on the International Language problem (with its solution!) in the course on Comparative Philology advertised.

ALAN TOWSEY.

-----  
KRITIKO skribita en libro de predikoj:--

Ĉe se inundo ree venus  
Al nia mondo peka,  
Kvankam la tero subakviĝus,  
Ĉi libro restus seka.

-----

DUMB in SIXTEEN LANGUAGES.

The following is a translation from "Sistema Kurso de Esperanto." The author is a Rumanian, Dr. H. Fisher. (F.R.B.)

I had just taken a seat in the restaurant car from Budapest to Istanbul, when I noticed a foreigner trying vainly to make himself understood to a waiter. The waiter used without success all the languages he knew:- Rumanian, Serbian, Turkish, Bulgarian and Russian. With a wish to help I walked over to the passenger and in German, French, Italian, English, Hungarian, Spanish and Greek asked him what I could do for him. My efforts too were in vain! He knew not one of the ten languages the waiter and I knew between us.

Then I recalled an article on Esperanto that I had read desultorily some time before. "Do you speak Esperanto?" I asked. "Yes, I do," came the reply; his face lit up. He continued to address me in that tongue, which however I did not understand. You see, that phrase was the only one in Esperanto that I knew.

The stranger, on remarking my difficulty, thought of something. He handed me an "Esperanto Key," of which there are editions in several languages. Although but a tiny book, it contains the grammar in outline and enough words to get along with.

I set out to study the booklet, and ten hours afterwards when I boarded ship for the Far East I was able to speak Esperanto. One of my fellow passengers was a Swede who knew four languages: Swedish, Danish, Norwegian and Finnish. We three, the Swede, the waiter and I spoke among us sixteen languages, but the collection was not sufficient to break the barrier of dumbness. From then on I've been an ardent Esperantist.

ĈENLETEROJ.

Antaŭ kelkaj jaroj estis manio skribi "Ĉenleterojn." Multe sensarĝante tiujn, kiuj suferis pro ili, tiu ĉi manio grade elmortis. Lastatempe, tamen, ŝajnas ke tiaj leteroj emas reapari.

Ĉenleteroj kutime prezentigas pro iu bonfara institucio. Priskribinte la institucion, oni petas vin sendi ses pecojn al ĝi kun via nomo kaj adreso---ankaŭ bonvole faru tri kopiojn de tiu letero kaj sendu al tri personoj kiuj same skribos. Vi devas rimarki la numeron de via letero kaj doni la sekvantan numeron al viaj tri. Fine, oni avertas vin ke vi tute ne kaj pro nenia kialo devas permesi al vi (oni estas ĉiam trege emfaze pri tio) perfidi al via devo, kaj per tio, frakasi la ĉenon. Se vi faras tion, vi kulpigos pri multa perdo al la bonfaradoj de la institucio. Ofte la letero finiĝas per duonminacoj: "Tiaj kiaj la riproĉoj de via konscienco eĉ ĝis morto."

Post multaj tiaj leteroj, mi forĵetis ilin, sed komence mi faris kiel dezirate. Fakte, estas malfacile eviti tion kiam oni ricevas leteron de amiko kiu poste demandas pri via reago al sia, kaj estos vundata pro vera sed nekontentiga respondo de vi. Kontraŭe estas tute facile kiam vi ricevis ĉenleteron de nekonato. Kiam tio okazas sendube iu malfeliĉa individuo, ne deziranta malkontentigi unu amikon aŭ, por eviti tion, ĝeni tri, fermis la okulojn, malfermis la telefonadresaron kaj per blind pinglo trifojne pikis la paĝon kaj tiel akiris siajn tri viktimojn.

Antaŭ kelkaj jaroj oni fondis en Anglujo ĉenleteron por tre bone konata kaj populara institucio por senhejmaj infanoj. Tion tre vasta estis la respondo ke la institucio estis preskaŭ sufokita de poŝtaĵoj. Estis necese starigi specialajn oficejojn, dungigi ekstran personaron, presi apartajn kvitancojn kaj amasigi stakojn da poŝtmarkoj kaj kovertoj, ĉar la leteroj alvenis po plensako.

Tiuj kiuj sugestis 100 kiel la numeron celotan sen frakaso de la ĉeno simple ne komprenis pri kiu ili parolas. La letero kun la numero 1 iras al tri personoj, do, kun la sendinto, 4 personoj estas koncernitaj. Ĉiu el la tri sendas 3, aŭ 9 leterojn kiuj portas la numeron 2, do, kun la aliaj 4, 13 personoj nun estas koncernitaj. Simile, la leteroj kiuj portas la numeron 3 levas la nombron de personoj al 40. Estas ja mirind kiel rapide progresas la nombroj de la leteroj kaj samtempe kiel malrapide relative iliaj numeroj., tiel ke, post kiam letero 19 forsendiĝis, la tuta loĝantaro de la mondo ricevis kopion, ĉiam supoze, ke la ĉeno ne estas frakasita.

Sed kompreneble, anglan leteron oni sendus nur al parolantoj de la angla lingvo kaj do eĉ pli frua numero sufiĉos por fini la aferon.

Sekve de tio, la venontan tempon en kiu vi ricevos ĉenleteron, s enhezite faligu ĝin en la rub-paperkorbon. Faru tion sen la plej malgranda piko de la konscienco. Ne estas vi kiu estas la pekulo. La pekulo estas la stultulo kiu komencis sian pestan ĉenon.

-----L.E.BAILEY.

La plej inteligenta animalo, ekster la homoj estas la antropopite- (ko.  
La plej helpa animalo al la homoj estas la tervermo; ĝi dismova-  
as la teraĵon, per tio pliligante ties fruktodoneco.

(Represe el "Fauna.")

"Mortas junaj, tiuj, kiujn amas la dioj." Mi preferas interpreti tiun sentencon jene: La amatoj de la dioj neniam maljuniĝas; ili konservas sian junecon, negrave kiom da jaroj ili havas.

(E.G. en "Observer.")